## Redakcia noto

**Bildo el *Scienca Revuo*[1] elektata kiel "Specio de la Tago" laŭ IUCN-iniciato: la Liberia arbotrua krabo**

**Thema:** **RE: URGENT: Image for Species of the Day** [2]
**Datum:** 03.03.2011 19:06:23 Westeuropäische Normalzeit
**Von:** Katharine.HOLMES@iucn.org
**An:** Isaesachs@aol.com

Kara *Ruediger Sachs*,

mi tre dankas al vi pro la malavara transdono al IUCN de la foto de la arbotrua krabo el Liberio *Globonautes macropus*[3] por la projekto "Specio de la Tago". La profiloj ellaboritaj estis treege sukcesaj, kio estas grandaparte dankenda al la grandiozaj fotoj. Pri tiu ĉi sukceso ni ŝatas pluetendi nian originan kopirajt-peton por uzi la Liberian arbotruan krabon kiel "faktodokumenton" (*"fact sheet"*), kompletan kun bildon, sur la Interreto post 2010. La bildoformato sur la faktopaĝo eble ete ŝanĝiĝos, sed la kopirajta permeso ĉiam estos aldonita al la fotoj.

Ni ankaŭ bezonas peti vian permeson pri publikigo por la bildo, kiun vi donis por la reta iniciato de IUCN en 2010 "Specio de la Tago", en nova libro publikigota en septembro pere de *Harper Collins*-Eldonejo. Tiu ĉi libro celas konsciigi pri endanĝeritaj specioj kaj la "Ruĝa Listo" de IUCN, kaj prezentos ĉiujn profilojn de la pasintjara retpaĝo "Specio de la Tago". La libro bezonas mondvalidajn permesojn en ĉiuj lingvoj por uzo ekskluzive en presita kaj elektronika versioj.

Kvankam atendante ankoraŭ konfirmon, ni esperas ke la libro estos publikigita en 4 aŭ 5 lingvoj, kaj eldonita ankaŭ kiel *eBook* kaj *iApp*. Via nomo certe estos agnoskita apud la bildoj kaj ĉiu estonta peto por uzo de la bildo estos menciita rekte al vi.

Bonvolu doni al ni vian poŝtadreson, kaj ni sendos al vi omaĝan aŭtoran ekzempleron de la anglalingva eldono de la libro, fine de tiu ĉi jaro, kiel dankon pro la uzado de via bildo.

Plue, ni estos treege dankaj, se vi bonvolos doni al IUCN la plenrajton uzi vian bildon por la retpaĝoj de IUCN kaj la ruĝlistaj. Via nomo ree estos plene menciita ĉe la bildo kaj en alta sekurformato neforigebla. Ĉiuj eksteraj petoj por uzado estos senditaj rekte al vi. Bonvolu sciigi nin ĉu vi pretas plivastigi vian kopirajtan permeson por la supre menciitaj uzadoj.

Multan dankon, *Kat Holmes*
IUCN-sekretariino


---

[1] el la artikolo: "La krabo, kiu vivas en arboj" (dulingva: angla kaj Esperanto) de la aŭtoroj *N. Cumberlidge & R. Sachs*, *Scienca Revuo*, Vol. 51 (2000) Kajero 4, p. 12-32.

[2] La sekvan (origine anglalingvan) retmesaĝan tekston esperantigis *R. Sachs*


[3] temas pri kolora fotaĵo el la supra *Scienca Revuo* 4/2000, p. 27: Bildo 4: "Portreto de Globonaŭto makropoda sur arbotrunko" (fare de *R. Sachs*).





La bonnatura arbotrua krabo trankvile restas en la manplato kaj montras siajn ekstreme longajn delikatajn gambojn – la sekreto de la kapablo grimpi sur arbon.

[Ambaŭ fotaĵoj el *Scienca Revuo* (en koloro), Vol. 51 (2000), Kajero 4, p. 27]



Portreto de *Globonautes macropus* (Globonaŭto makropoda) sur arbotrunko.

Granda Honoro por *Scienca Revuo*:
Tiu ĉi krabo-portreto el la organo de ISAE SR 4/2000 nun troviĝas ankaŭ en la p.185 de la libro *"Species on the edge of survival"* ("Specioj rande de transvivado") eldonita de IUCN (*International Union for Conservation of Nature*), Svisujo kaj *Harper Collins Ltd.*, Britujo, 2011, ISBN 978-0-00-741914-2: *The IUCN Red List of Threatened Species* (la IUCN Ruĝa Listo de endanĝerigitaj specioj).